

Enskribo

pri la dua komitata kunveno je la 26.1.1959 en kafejo Slavia. Ĉeestis samideanoj: Vondroušek, Friedrich, Adamcová, Lorková, prof. Scheiber, dro Šikula, Borkovec kaj Kořínek. Post la malfermo fare de la prezidanto s-ano Kořínek tralegas la sekretarian raporton por la okazonta jarkunveno. S. Vondroušek kaj Šikula proponas kompletigi ĝin pri la vizito de la Svisa karavano kaj en aliaj punktoj. La raporto estas aprobita. S-o Borkovec per kelkaj vortoj informas pri la financa stato. S-o Vondroušek sciigas pri siaj traktadoj kun la Foiro de Brno, kiu akceptis nian kunlaboron. Oni taskis al ni la eldonotan "Informa Foiro Bulteno de Brno" distribui tra la mondo. Niaj rondetanoj skribos 300 adresojn al delegitoj de UEA kaj Esp. gazetoj kaj disaŭdigoj en la mondo. Ĉio okazos senpage, brigade. S-o dro Šikula raportas, ke la sekretario de Ĉ.E.K. s-o Malík aliĝis al la grava plendo de s-anino Mansfeldová koncerne la malutiligan agadon de s-ro Ballay, kiu ree skribis 12 mensogdenuncajn leterojn al diversaj instancoj kaj C.K. de K.P.Ĉ. Oni al ni rekomendis eksigi lin el nia rondeto kaj rigore admoni antaŭ la partia komitato. Estis decidite ne akcepti s-on Ballay por la jaro 1959 en la komitaton. Estis proponitaj novaj kandidatoj anstataŭ Ballay kaj forestanta s-o Kaláb. Oni interkonsentis pri s-anino Věra Podhradská kaj s-o Ant. Reček. S-anino Lorková raportas pri la preparoj por la balo, anonciĝis jam ĉ. 80 eksterbrnaroj. S-ano Vondroušek proponas al Domo de Kulturo prelegon pri Zamenhof kaj proponas al la Urba Nacia Komitato nomigon de unu strato per nomo de Dro Zamenhof.

La kunveno estis finita je la 21.20 h.

Enskribis Jiří Kořínek

Enskribo

pri la jarkunveno okazinta la 3an de februaro 1959 en la klubejo en hotelo Slovan.

Je la 20.45 malfermis s-ano Vondroušek la jarkunvenon anoncinte antaŭ kelkajn aktualaĵojn kaj salutinte la gaston s-anon VI. Novobilský el Ústí n.Lab. Li invitis s-anon Kořínek tralegi la jarraporton sekretarian. Post kiam la sekretaria ampleksa raporto estis aprobita, tralegis raportojn la kasisto s-ano Borkovec, la revizoro s-ano Střelec kaj la bibliotekisto s-ano Ballay. Poste, post mallonga paŭzo, okazis la nova elekto de prezidanto de la rondeto kaj de la nova komitato. La kunvenon post la elficialiĝinta komitato ekgvidis s-ano V. Duroň. Li dankis al la prezidanto s-ano Vondroušek kaj al la komitato, al kiuj estis donita absolutorio. Poste estis ĉiesvoĉe elektita laŭ propono de s-ano Solčani nove la prezidanto Jos. Vondroušek. La nove elektita komitato konsistas el: Josef Friedrich, Marie Adamcová, Marta Lorková, Tomáš Borkovec, Prof. Dro Jar. Šikula, Prof. Vil. Scheiber, Ant. Reček, Jiří Kořínek, Věra Podhradská, Nelly Zitová, revizoroj Milosl. Němec kaj Sáva Střelec. Bibliotekisto Josef Ballay.

La kunveno finiĝis je la 22a horo.

Enskribis Jiří Kořínek